
ĝis revido



**ĈIPAĜE |** MONTO “KILIMANJARO”, LA PLEJ ALTA EN AFRIKO, KONKERITA DE MOMENTON 2004



# MOMENTON!





## SIMBA, SIMBA!

### “MEZE DE LA VOJO, ESTIS LEONO...”

JARFINO2004

brazilaesperantistajunularaorganizo BEJO



ĈIPAĜE | SUNLEVIĜO EN KENIO





# MOMENTON!

#06 JARFINO 2004



Saluton, kamaradoj!

Certe vi jam rimarkis ekde nia antaŭa numero, ke "Momenton" estas plenkolora!
Ĝia bela aspekto instigas nin daŭre labori por ke vi ĝuu ankaŭ ĝian enhavon.

Ĉi-numere nia konstanta kunlaboranto kaj vojaĝemulo Roĝer Borges, vizitis Afrikon, la nigra kontinento, kaj revene portis al ni tiun specialan raporton ornamitan per belegaj fotoj.

BEJO invitas vin partopreni la Reton de Reprezentantoj kaj la konkurson kiu premios la venkonton per eksterlanda vojaĝo. Jen granda oportuno! Informiĝu kaj partoprenu.

Parolante pri informiĝo, ĉu vi scias kiel tion fari per Interreto? Informado estas la temo de la unua artikolo el serio de tri, kiuj traktas tiun gravan nuntempan rimedon.

BEJO-jarfino, Intervjuo, gravaj historiaj mienoj kaj eĉ recepto enestas en ĉi tiu numero de nia revuo, kiu estas aperta por aperigi viajn kunlaboraĵojn. Se vi aŭ via junulara grupo havas emon publikigi ion, ne hezitu kontakti nin.

Buntan legadon!

> Rogener Pavinski, Jarfino/2004

MOMENTON > Kvarmonata revuo de BEJO.
**REDAKTADO** | Rogener Pavinski, Ribeirão Preto.
**ARTO kaj PRILABORADO** | Roger Borges, Madrid.
**SUPERRIGARDO** | Ísis Okabe Piton, Campinas.
**REVIZIADO** | James R. Piton, Campinas.
**DISTRIBUADO** | BEJO, fondita en 1967 (Landa Sekcio de TEJO ekde 1968).
Caixa Postal 1097 13001-970 Campinas, SP BRAZILO

email: **bejoesperanto@yahoo.com.br** web: **www.esperanto.org.br/bejo**

# INTERRETO KAJ ESPERANTO >>>

## 1.0 INFORMADO

Kiu ankoraŭ ne konas Interreton? Nuntempe estas tre malfacile renkonti tiajn nesciantojn pri ĝi, se oni serĉas inter homoj, kiuj povas uzi komputilojn. Interreto ebligas rapide sendi diverstipajn informaĵojn tra la tuta mondo. Kaj esperantistoj ja profitas ĝin uzante tiun ĉi mirindaĵon precipe por informado, interkomunikado kaj disvastigado.

Tiu ĉi artikol-serio komenciĝas per la subtemo informado. La unua celo de Interreto estis ĝuste tio: efike kaj rapide interŝanĝi informojn. Por trovi iun specifan informon, oni uzas la serĉilojn aŭ katalogojn.

Serĉiloj estas sistemoj kiuj rapidege trovas informojn rilatajn al kelkaj ĉefvortoj. La ĉefvortoj devas bone precizigi la serĉatan temon. Por sukcesi tion, oni ordinare uzas kelketajn ĉefvortojn: ju pli da ili, des pli precizaj la montrotaj rezultoj.

Tamen, tro da ili rezultas nenion utilan. Tre efika serĉilo estas Guglo (angle Google):

En Esperanto -
http://www.google.com/intl/eo/

En la Portugala -
http://www.google.com.br


Kaj la katalogoj estas paĝaroj, kiuj taksas kaj organizas pluregajn ligilojn al aliaj retejoj. La katalogoj estas bone organizataj laŭ multaj temoj kaj subtemoj. Ekzistas multegaj tiaj katalogoj. Mi citas nur du:

DMOZ -
http://dmoz.org/World/Esperanto

Yahoo -
http://www.yahoo.com.br

**KONTRIBUIS** | FELIPE CASTRO (NATAL/RN)





**Informado en aŭ pri Esperanto jam troviĝas en multaj retejoj. Se vi ne deziras serĉi laŭ la antaŭaj vojoj, vi povas pli rekte komenci en tiu ĉi:**

**Esperanto.net -
http://www.esperanto.net**

**Kaj kelkaj tre interesaj retejoj pri novaĵoj estas:**

**Ĝangalo
http://ĝangalo.com**

**NUN -
http://www.esperanto.se/nun**

**Libera Folio -
http://www.liberafolio.org**

**TEJO Aktuale -
http://www.tejo.org/tejo-aktuale**

**Interreto estas tre vasta informarujo. La antaŭaj ligiloj almenaŭ taŭgas por komenci serĉadojn.**

**En la venonta numero de Momenton!, ni konatiĝos kun la plej gravaj retejoj kaj iloj rilate al nia dua subtemo: KOMUNIKADO.**



# NI KRESKU KUNE >>>

## LA RETO DE REPREZENTANTOJ

La celo de RR estas disvastigi Esperanton inter la junularo kaj konsciigi la junularon pri la graveco de BEJO, ĝia rolo en la esperanta movado, krei novajn aktivulojn, fortigi la junan movadon en siaj regionoj kaj helpi BEJO-n dum aranĝoj en siaj urboj kie BEJO havos kongresojn kaj aliajn aktivaĵojn .

1. Por aliĝi al RR, oni devas partopreni la Reton de Reprezentantoj.

2. Dum Brazila Kongreso kaj per poŝto por tiuj RR-anoj, kiuj ne povos iri al la kongreso, oni ricevos diplomon. Kiu sukcesos aliĝi pli da junuloj al BEJO dum la jaro ricevos premion, proporcie al la loĝantaro de sia urbo. La premio estos difinita en la komenco de ĉiu jaro.

3. La RR-ano ricevos personan karton kiel identigilon de Reprezentanto de BEJO.

4. La RR-anoj ricevos materialon de BEJO por disvastigi Esperanton en sia urbo, tio estas: ekzemplerojn de "Momenton!" kaj "Brazila Esperantisto", faldfoliojn pri BEJO, pri Pasporta Servo, KD-jn por disvastigi esperantan muzikon, ĉemizojn de BEJO inter aliaj materialoj . Tiun materialon la junulo ricevos laŭ la kvanto da membroj, kiujn tiu sukcesos varbi al BEJO.

5. La RR-ano devas raporti pri siaj aktivaĵoj al la respondeculo pri RR kaj en la diskutlisto de RR. Duboj kaj ideoj devas esti lanĉitaj kaj diskutataj en tiu medio.

6. Ĉiujare, je la 1ª de Julio, la RR-ano devas skribi detalan raporton pri sia agado al la respondeculo pri RR.


7. La respondeculo pri RR devos liveri la raporton ĉiokaze por ke ĝi eniru en la estrar-raporto pri la koncerna jaro. La estraro devas prezenti sian raporton, kiu inkluzivas ĉiujn aliajn.

Partoprenu en RR-diskutlisto:
**http://br.groups.yahoo.com/group/bejorr**
**bejorr@yahoo.com.br**

**PREMIO: PLENA ILUSTRITA VORTARO - PIV!**



**PREMIO: PIV!**



# KULTURAJ ATAŜEOJ >>>
## PREMIO: EKSTERLANDA VOJAĜO!

**Ĉu vi ŝatus gajni biletojn por eksterlanda vojago?***
Do partoprenu la novan konkurson de BEJO!

La junulo partoprenonta la konkurson devas verki monografion pri la temo "La Religiaj Baroj". Ni klarigas, ke pri tio oni atendas seriozan analizon pri la socia problemo, kiun nia mondo suferis kaj suferas. Ne temas pri atako al kiu ajn kredo.

Dum la Kongreso de BEJO kaj BEL en Porto Alegre, la konkursanto devos persone kaj oratore prezenti sian verkaĵon antaŭ skipo, kiu elektos la plej bonan monografion.

Kiel premio, vojaĝo al Euxropo por ke la venkinto prelegu pri Brazilo en almenaŭ ses E-rondoj. Por tio oni nepre devos uzi Pasportan Servon de TEJO. La travivaĵo estos profita ankaŭ al aliaj junuloj, ĉar la vojaĝinto poste prelegos en brazilaj kongresoj kaj raportos en niaj eldonaĵoj.

Oni findiskutas kelkajn detalojn de la regularo, baldaŭ disponebla ĉe la hejmpaĝo de BEJO.

**POR PLIAJ DETALOJ |** VIZITU HTTP://WWW.ESPERANTO.ORG.BR/BEJO







# SAFARI >>>

## VOJAĜO TRA LA NIGRA KONTINENTO

Ekzistas malsano, kiu atingas preskaŭ ĉiun vojaĝanton, kiu eniras la Nigran Kontinenton. Ĝi nomiĝas "l'afrika malsano" - stranga sento laŭ kiu oni, antaŭ ol forlasi la kontinenton, jam bezonas reveni. Inter la homoj, kiuj ĝin suferis, troviĝas Ernest Hemingway, Theodore Roosevelt kaj Karen Blixen, la verkistino de "Memoroj de Afriko". Kaj nun, ankaŭ mi...

Konsiderata de antropologoj kiel 'lulilo de la homaro', Kenio oferas al vojaĝantoj ĉiujn eblecojn por ne-ordinaraj, naturplenaj aventuroj. Sovaĝaj bestoj, ĝangaloj, savanoj, kaj ankaŭ grandegaj urboj kiel la ĉefurbo, Nairobi. Ne gravas kiom da Tarzan-filmoj vi jam spektis en via vivo: nenio preparos vin por la jara migrado de gnuoj tra la naturrezervejo "Masai Mara".

En tiu regiono troviĝas pli ol 400 specioj de mamuloj, kiel elefantoj, zebroj, antilopoj kaj hipopotamoj. Mi tra la parkoj Masai Mara kaj Serengeti (Tanzanio) partoprenis safari-ekzpedicion, kaj meze de la vojo, estis leono... Kaj multe da krokodiloj (ja, esperantistoj!)

En Kenio estas pli ol 70 tribaj grupoj. Bedaŭrinde, la malsamecoj inter ili pli kaj pli ne plu videblas pro la impakto de la valoroj Okcidentaj. Ĉiukaze, la unua demando inter du nekonataj homoj estas 'De kiu tribo vi devenas?'.

La angla kaj la svahila ("Swahili") estas la lingvoj instruataj tra la lando, sed kompreneble estas amaso da aliaj uzataj de la diversaj etnoj (ekzemple Kikuyu, Luo kaj Kikamba). Mi forte rekomendas al vojaĝantoj almenaŭ eklerni la svahilan. Ĝi estas sufiĉe facila kaj rolas kiel Esperanto inter malsamtribanoj. Vi certe jam konas multajn vortojn en la Svahila! Jen kelkaj:

**JAMBO!** (Saluton), **SIMBA** (leono), **SAFARI** (vojaĝo), **ASANTE SANA** (dankon), **HAKUNA MATATA** ("ĉio glatas!"), **BUANA** (sinjoro), **BIBI** (sinjorino), **POLE POLE** (malrapide), **POMBE** (biero), **LALA SALAMA** (ĝis revido)...

En Kenio kaj Tanzanio oni trovas diversajn religiojn, ĉefe kristanojn, islamanojn kaj homojn, kiuj sekvas siajn pratempajn tribajn religiojn.

La kuirado en tiu regiono konsistas precipe de manĝaĵoj, kiuj povas multe satigi homojn, je kosto malmulta. Se mi devus elekti nacian pladon, mi dirus "nyama choma" (kapro-ĉurasko). Sed mi ankaŭ manĝis struton, zebron kaj krokodilon en revicigo-manĝejo ("rodízio") tie...

**RAPORTIS |** ROGER BORGES (WWW.ROGERBORGES.COM)
**MALDEKSTRE |** APUD LAGO NAIVASHA (KENIO)



MASAI MARA, KENIO 2004





**LA MASAI POPOLO** (masajoj) estas semi-nomada tribo el Afriko, kiu vivas meze de naturo laŭ ege antikvaj, tradiciaj vivmanieroj.

Eĉ se konataj kiel kuraĝaj militemuloj, la Masai-kulturo ĉirkaŭas sin per siaj bovidoj. Unu el la ĉefaj spiritaj kredoj estas, ke la pluvo-dio Ngai donacis ĉiujn bovojn al la masajoj, kaj pro tio iu alia, kiu posedas bovon, certe ŝtelis ĝin de la Masai. Kiel oni povas supozi, tio kaŭzis sennombrajn batalojn kontraŭ najbaraj triboj dum multaj jarcentoj. La tipa masaja domo estas konstruita de sekaj fekaĵoj de bovidoj kaj de elefantoj, kaj kelkaj ceremonioj inkluzivas la trinkadon de bovida sango.

Kaj certe estas amaso da ceremonioj. Eble la plej konata estas la "saltado", farata de junaj masajaj militistoj ("morani"), kiuj saltas en la aero por montri sian superan forton kaj "altecon".

Por edziĝi, la masaja viro bezonas posedi 10 bovinojn, 5 kaprojn kaj 5 ŝafojn po virino (se li havas 20 bovinojn, 10 kaprojn kaj 5 ŝafojn li rajtas havi 2 edzinojn, kaj tiel plu, ĝis 4 edzinojn).

**MALDEKSTRE |** 200 MIL ZEBROJ ELMIGRAS (SERENGETI NATURREZERVO, TANZANIO)
**DEKSTRE |** DU RINOCEROJ PRIDISPUTAS LA AREON (LAGO NAKURU, KENIO)



Sed malsame ol aliaj tribaj kulturoj, la virinoj havas fortan voĉon. En la masaja kulturo ĉiu virino estas egala, kaj ne "valoras" pli ol alia, ekzemple pro sia beleco.

Ili estas konataj pro siaj senharaj kapoj, helkoloraj vestaĵoj kaj la manko de unu el siaj subaj dentoj.
Maljunaj viroj faras cirkumcidon al la junaj knaboj, kiuj ne estas permesataj fari bruon dum la rito. Maljunaj virinoj faras stumpigon de generiloj al la junaj knabinoj, kies krioj ja estas permesataj. La registaro provis haltigi tiun praktikadon tamen ĝi rezultis nefruktodona, ĉar estis la propra Masai-virinaro, kiu defendis la tradicion.

Mia lasta vojcelo en tiu neforgesebla vojaĝo estis ZANZIBARO, insulo ĉe la Hinda Oceano. Ĉu vi scias, ke Freddie Mercury, la kantisto de Queen, tie naskiĝis?

Kaj ekde Zanzibaro, en 1871, Sir Henry Stanley organizis la faman ekspedicion por serĉi David Livingstone. Post 236 tagoj, li trovis la skotan misiiston apud Lago Tanganiko, kaj eldiris sian famegan frazon.

## "D-RO LIVINGSTONE, MI SUPOZAS?"







# MAN-EN-MANE >
## CARLOS DRUMMOND DE ANDRADE

Mi ne estos la poeto de mondo kaduka.
Mi ankaŭ ne kantos la mondon estontan.
Mi ligiĝas al vivo kaj rigardas miajn kunulojn.
Ili silentemas sed nutras grandajn esperojn.
Inter ili, min mirigas la enorma realo.
La nuno tiom grandas, ni ne fordisiru.
Ni ne tro fordisiru, ni kuniru man-en-mane.

Mi ne estos la kantanto pri virino, pri rakonto,
mi ne mencios la suspirojn je vesperiĝo, la pejzaĝon
vidatan el la fenestro, mi ne disdonos dormodrogojn nek
leterojn de memmortiginto,

mi ne fuĝos al la insuloj nek estos kaptita de serafoj.
La tempo estas mia objekto, la tempo ĉi-estanta, la homoj ĉi-estantaj, la vivo ĉi-estanta.

**TRADUKIS |** NIELZ SENA
**MALDEKSTRE |** SUNSUBIRO EN ZANZIBAR, TANZANIO




# JARFINO 2004
## bejo povas





## HECTOR HODLER>
### 1887-1920

Sviso, li lernis Esperanton je la 16-jaraĝo kaj baldaŭ poste fondis klubon kaj etan gazeton “Juna Esperantisto”. En 1908, Hodler kaj aliaj fondis UEA-n (Universala Esperanto-Asocio). Tiam li estis 21-jara kaj jam estis preninta la redaktadon de la revuo “Esperanto” kiun li daŭrigis dum 13 jaroj ĝis sia morto. Hodler speciale interesiĝis pri sociaj demandoj, pacismo kaj bestprotektado.




## JULIO BAGHY>
### 1891-1967

Verkisto kaj aktoro, naskita en Hungario, li lernis Esperanton en 1911 kaj komencis sian laboron por la Esperanto-movado dum ses-jara milita kaptiteco en Siberio, kie li gvidis multajn kursojn por diversnacianoj. Estis lia iniciato, laŭ kiu la naskiĝtago de Zamenhof fariĝis la tago de la esperanta libro. Liajn verkojn karakterizas la tendenco, kiun esprimas lia devizo: "Amo kreas pacon, Paco konservas homecon, Homeco estas plej alta idealismo."



## EŬGENO LANTI>
### 1879-1947

Normando, Lanti estis instruisto pri manlaboro kaj geometria desegnado. Li lernis Esperanton en la fronto dum la unua mondmilito. Tiam li verve fariĝis kontraŭa al ĉia naciismo. En 1919 en Parizo, li reaktivigis la asocion Liberiga Stelo, kiu iĝis SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) en 1921. Li ankaŭ iniciatis la redaktadon de la Plena Vortaro, antaŭulo de la nuna PIV. Suferante pro nekuracebla malsano li pendumis sin per duŝeja aparato en Januaro 1947.



# INTERVJUO >>>
## ELISABETTA CIRIO

DUM EKSPOZICIO pri la romana kulturo en la mondfama Museo del Prado, en Madrido, Hispanio, Momenton faris ekskluzivan (kaj absolute frenezan) intervjuon kun Elisabetta Cirio, komitatanino A de TEJO por BEMI (Biciklista E-movado Internacia) kaj komisiito pri KER (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj).

**KIO ESTAS LA UNIVERSO?**
hahaha... la universo estas sufiĉe nekonata afero, kie estas... planedoj kaj steloj... kaj eble pli ol unuviva sistemo...

**KIO ESTAS DIO?**
hmmmm... nekonata afero por mi.

## "LA UMBILIKO DE LA MONDO? MI NE SCIAS... AŬ: MOMENTON! ;)"

Elisabetta interesiĝas pri la Sociologio de la E-movado, kaj verkis disertacion pri "Transnacia Identeco kaj la Esperanto-Movado" kadre de ŝia unua Universitata diplomiĝo. Ŝi ankaŭ laboras por rifuĝintoj kaj azilpetantoj en Britio.

**KION VI FAROS EN 2005?**
mi ne scias, mi ŝatas ne plani ĉar la vivo ĉiam ŝanĝiĝas.... sed eble mi iros al Afriko.

**KIO ESTAS BRAZILO?**
Mirinda lando, certe! Mi estis tie dum IJK2002 kaj mi ŝategis, ĉar la homoj estas tiel amikemaj, kaj plena je... suno!

**KIO ESTAS ESPERANTO?**
Simple internacia lingvo, kiu ebligas komunikadon inter la homoj.

**KIO ESTAS ĜIA ESTONTECO?**
estas la volo kaj la laboro de la esperantistoj mem. Kaj estas simple konatigi la homojn kun la ideo de internacia, demokratia komunikado... simple... la komunumo esperantista longe daŭros.

**AL BRAZILA JUNULARO?**
mi pensas, ke la brazila junularo estas ege vigla kaj ege aktiva, kaj mi bondeziras al vi plenan sukceson por viaj projektoj!

**INTERVJUIS |** ROGER BORGES
**DEKSTRE |** ELISABETTA CIRIO (ITALIO)








# VEGETARA KUIRADO >>>
## LENTA HAMBURGERO



### KIEL FARI:

Kuiru la lentojn ĝis plena suplo. Elfluigu la akvon kiel eble plej, knedante ilin en kribilo. Metu ilin en grandan ujon. Aldonu la cepojn, tomatojn kaj ĉiujn spicojn. Miksu tre bone per ligna kulero. Sekve aldonu la avenon kaj la farunon ĝis ekhavi firman kaj konsistan knedaĵon, kiu ne algluiĝas al la manoj kaj jam povas esti modlata. Eblas per ĝi ankaŭ fari knelon. Modlu ilin, volvu per plastaj sakoj kaj metu en la frostigilon. Fritu en malmulta oleo. Ne timu tro spici la pastaĵon, ĉar post la fritado la spico fariĝas pli milda. Tio cxi estigas 50

**NECESAS:**
500 g da **kuirita lento**
500 g da **aveno**
100 g da **manioka** aŭ tritika faruno
2 **cepoj**
4 **tomatoj**
1/2 **pimento**
4 saketoj el **legoma spico**
**salo** kaj **aliaj spicoj laŭvole**

**TRANSDONIS LA RECEPTON ;)** | ROGENER PAVINSKI (RIBEIRÃO PRETO, SP)